

Clemens von Brentano,

Vespera muziko

tradukita de Manfred Retzlaff

Plende kantas fluto ree,
Plaŭda font' en la silent';
Oraj sonoj sonas vee,
alblovitaj de la vent'.

Milda peto kaj deziro,
Mian koron tuŝas ĝi;
De la tonoj la sopiro,
Lume vidas ĝi al mi.

*Traduko de la Germana poemo "Abendmusik" de CLEMENS VON BRENTANO (*1778 – †1842) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1984.*

MR-093-1 / Arg-672-1350 (2012-11-23 12:36:49)

Vidu la retejojn <http://de.wikipedia.org/wiki/Abendst%C3%A4ndchen> kaj http://de.wikipedia.org/wiki/Clemens_Brentano.